

Mèng Hàorán,
Somera vespero
tradukita de Manfred Retzlaff

Somertage en Nanting mi sopiras al Xinda

De l' montoj ora lumo nun
foriĝas en vespera pac'.
Ekestas trema bild' de l' lun'
sur de l' laĝeto la surfac'.
Kun loza kap-hararo mi
sur la teraso kuŝas nun,
kvietas mia vivo, ĝi
sin donas al la lum' de l' lun'.
Flariĝas melilot-odor',
ĝi lante supreniĝas al
la dom' dum la vespera hor',
susuras jen ros-guto-fal'.

*Traduko de la ĉina poemo "Shān guāng" de MÈNG HÀORÁN (*689 – †740) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).*

Arg-995-2008 (2014-04-21 20:09:05)

Mi, Manfred Retzlaff, esperantigis la poemon laŭ la germanigo, kiun verkis la germana poeto Manfred Hausmann. Pri tiu vidu la retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Manfred_Hausmann. La subtitolo "Somertage en Nanting mi sopiras al Xinda" signiĝas, ke la poeto, sidante en la suda pavilo "Nanting", sopiras je sia amiko Xinda.

Mèng Hàorán,
Shān guāng

Xià rì nán tíng huái xīn dà

Shān guāng hū xī luò
Chí yuè jiàn dōng shàng
Sǎn fà chéng xī liáng
Kāi xuān wò xián chǎng
Hé fēng sòng xiāng qì
Zhú lù dī qīng xiǎng
Yù qǔ míng qín tán
Hèn wú zhī yīn shǎng
Gǎn cǐ huái gù rén
Zhōng xiāo lǎo mèng xiǎng

*Verkinto de tiu ĉi ĉina poemo estas MÈNG HÀORÁN (*689 – †740).*

Arg-995-2006 (2014-04-21 20:01:57)

La ĉina-lingva teksto de tiu ĉi poemo troveblas sub <http://www.chinese-poems.com/m6.html>. Tie estas indikita ankaŭ laŭvorta kaj laŭsenca angligoj. Pri la aŭtoro vidu la vikipediejon http://en.wikipedia.org/wiki/Meng_Haoran.